

la
verda
stelo



ESPERANTO
NEDERLAND

SEKCIO GRONINGEN-DRENTE
&
FRISA ESPERANTISTA RONDO

septembro 2006



LA VERDA STELO

eldono de

ESPERANTO NOORD-NEDERLAND

ESPERANTO-KLUBO GRONINGEN-DRENTE

prezidanto

s-ro J.B. Swenker

T.W.S. Mansholtstraat 25

9728 MC Groningen

tel. +3150 527 45 72

retadreso:

prezidanto.groningen@esperanto.hobby.nl

sekretario

s-ino W. van Ganswijk-Vlasblom

Huygensstraat 27

9727 JA Groningen

tel. +3150 525 00 86

retadreso: wvganswk@xs4all.nl

kasisto

s-ro L. Staghouver

Julianalaan 25

9781 ED Bedum

tel. +3150 301 40 15

retadreso: luitstaghouver@home.nl

FRISA ESPERANTISTA RONDO

s-ro W. Akkerman

Westerein 14 a

8571 GB Harich (Frl)

tel. +3151 460 22 72

retadreso: wiebrenakkerman@hetnet.nl

ttt-ejo

<http://pingveno.nl/klubo>

kunvenejo

Dreesflat, W. Dreesstraat 1

ĉiun alternan ĵaŭdon ni kunvenas

de la 19h45 ĝis la 21h45

Esperanto-centro

T.W.S. Mansholtstraat 25

9728 MC Groningen

J.B. Swenker, tel. +3150 527 45 72

redakcio

Koos Scharroo

Wil van Ganswijk-Vlasblom

retpoŝto: laverdastelo@pingveno.nl



Enhavo

- 3 ... Esperanto Noord-Nederland ankaŭ rete
- 4 ... Klubkunvenoj, naskiĝdatrevenoj
- 5 ... Kio pri la nordo?
- 8 ... Herzberg, la Esperanto-urbo
- 10 ... UK 2008 en Roterdamo
- 12 ... Kafo-kolore
- 14 ... Esperanto Elektronike

Contributie Esperanto Noord-Nederland 2007

Afdelingslid (incl. abonnement LA VERDA STELO)	€ 12,50
Gezinslid	€ 6,25
Donateur (minimaal)	€ 7,00
Abonnement LA VERDA STELO	€ 7,00

Over te maken op Postbanknr. **3822472** t.n.v.

ESPERANTO NOORD-NEDERLAND te Bedum

Leden van afd. Groningen-Drente worden geacht lid te zijn van
ESPERANTO NEDERLAND

Vandaar dat wij hier ook het gironummer ervan vermelden:

Postbanknr. **375522** t.n.v. **ESPERANTO NEDERLAND** te Heerhugowaard

Lidmaatschap (incl. abonnement FEN-X)	€ 27,50
Gezinslid	€ 8,00



Esperanto Noord-Nederland
 Esperanto Nederland *sekcio Groningen-Drenthe*
 en rilatoj kun *Frisa Esperantista Rondo*

hejmpaĝo | estraro | kunvenejo | aktuale | ...

ankaŭ rete!

nova stelo en interreta firmamento

Interreton nuntempe preskaŭ ne eblas imagi neekzistanta. Multaj jam disponigis siajn informojn en tiu maniero. Ankaŭ Esperanto Noord-Nederland nun estas rete atingebla. Krom konstantaj informoj pri la asocio mem, konsultebblas ankaŭ plej freŝaj novaĵoj en la rubriko **Aktuale**. Tie vi povos trovi eventualajn lastajn ŝanĝojn pri klubkunvenoj, prelegoj, ktp.

Se vi volus relegi malnovajn eldonojn de *La Verda Stelo*, vi ilin trovos en la samnoma rubriko.

Grandan nombron da aliaj sciindaĵoj, ekzemple revuoj, asocioj, radio-elsendoj, kursoj, eventoj, ktp., vi trovos en la rubriko *Ligiloj*.

Esperanto Noord-Nederland troviĝas je: www.pingveno.nl

unuaj paŝoj de la kluba paĝaro



Antaŭ kelkaj semajnoj aperis en la rubriko *Aktuale* la alvoko de **Douwe Beerda** helpi al tradukado de kurso, kiun li faris kune kun la Universitato en la urbo Groningen. La temo estas *Permakulturo*, kiu estas agrikultura sistemo surbaze de certaj ekologiaj principoj por efektiviigi longedaŭran homan transvivaĵon.

“Same kiel la lingvon Esperanton, estus tiel logike, se oni ĉie aplikus tiun metodon”, diras Douwe. “Mi estas tiel konvinkita pri la sistemo, ke mi ŝatus distrompeti ĝin en la mondon. Ĉu Esperanto ne estus la plej bona rimedo por tio?”

Tial aperis la alvoko pri tradukhelpo. De diversaj flankoj oni tiun proponis. La afero nun bone disvolviĝas, kaj ni esperas, ke ĝi estos sukcesplena. Rigardu ambaŭ paĝojn, se ankaŭ vi volas helpi...

www.permacultuur.tk



Klubkunvenoj

septembro

- 7 ferioj
- 21 ŝercoj

oktobro

- 5 malferma vespero
- 19 temo: *Marjorie Boulton*

novembro

- 2 gasto: *Roy McCoy* de UEA
- 16 ludvespero
- 30 gramatiko

decembro

- 14 festvespero pro la naskiĝdato de Zamenhof

novembro

- 22 prelegos pri Esperanto s-ro *W. Akkerman* por ANBO, sekcio Gaasterlân-Sleat

loko: *De Treemter*, Bogermanstr. 3, Balk (Frl)
tempo: je la 14-a horo

Naskiĝtagoj

septembro

- 3 Wiebren Akkerman
- 17 H.W.T. van Hogen-Cornelissen
- 24 A.E. van der Heij-Alblas
- 26 G.M. van Reenen
- 30 A.H. Thomas-Nitzsche

novembro

- 9 J.B. Schouten
- 10 E.L. van der Roest

Gratulon!

oktobro

- 3 D. van der Heijden
- 15 C.H.T. Behr-Kunst
- 29 A.M.H. Dodebier
- 30 P. van der Vlis

decembro

- 15 H. Molthoop kaj
P. Reddingius-van Houtum
- 21 H. Leeuwerke-Kiers
- 30 R.J. Hettinga
- 31 A. van der Heij

Kio pri la nordo?

la 6-an de aprilo 2006

“Mi estas ĉi tie por komuniki, ne por instrui lingvon, kaj se vi ne komprenas min, vi nur ‘bip!’-umu, por ke mi sciu, ke mi alimaniere devas klarigi”, komencis *Sylvain Lelarge* sian interagan prelegon, kiun ĉeestis dek kvar personoj.

Ĝis li estis pli ol dudek-dujara, li, kiel franco, ne vere komprenis, kio estas alia lingvo. Tial li asertis, ke kvankam li estas inĝeniero pri agrikulturo, li tamen havas pli gravajn ‘diplo-mojn’, inter kiuj estas travivi kaj transvivi la traŭman periodon, kiun devas trapasi elmi-grinto al tute nekonata lando, kaj la lernejjarojn, kiujn li opinias tre tre enuigaj. Estis al li tre grava ankaŭ la fakto, ke li dum multaj jaroj uzis ne sian gepatran lingvon kaj poste tamen decidis fariĝi instruisto pri tiu lingvo, rigardante ĝin per okuloj de nederlandano.

Li havas tripersonan familion, en kiu ludas rolon kvar lingvoj: la franca, hungara, nederlanda kaj Esperanto. Lerni lingvon estas kvazaŭ eniri novan mondon, aŭ alidirekte, disvolviĝi novan flankon de sia personeco. Li kredas, ke ne la gramatiko plej gravas, sed la kreado de pozitivaj emocioj. Instruante lingvon, li volas ne esti instruisto tradicia, kiu instruas rekte el lernolibro, sed krei situaciojn por komunikiĝi.

Estas multaj manieroj formi opinion pri iu, kiun ni renkontas unuafoje, ekzemple rigardi liajn okulojn, vestojn aŭ lian kor-

pan lingvon, sed al Sylvain gravas la manojn, kiuj povas rakonti multon pri ties posedanto. Tion ni praktikis, sidante vidalvide de iu nekonata, kaj pafante demandojn por vere ekkoni la alian.

Ni dividiĝis en grupojn, ŝajnigante familiojn, por pravigi lian impreson, ke multaj hejmaj ordojn al infanoj ne temas pri eduko, sed pri la demando kiu el la gepatroj havas la plej grandan aŭtoritaton.

Post kiam li ‘naskis’ el sia teko por ĉiu ‘familio’ pupinfanon, kiu fojfoje eĉ similis al unu el ties ‘parencoj’, ni devis tion esplori, ordonante laŭvice, dum ĉiu ludis sian familian rolon.



Sylvain Lelarge

Liajn interagajn ekzercojn li prenis de

edukado.net, kiu estas interreta paĝaro kun multaj ekzercoj de minimume 50 kreantoj, inter ili redaktorino *Katalin Kováts*, lia edzino. Tie troviĝas interalie la bela rubriko *Monda Mozaiko*, en kiu oni ĉiusemajne trovos novajn tekstojn pri interesaj, kredoblaj aŭ malpli realaj okazintaĵoj en la mondo, kaj ankaŭ ekzercojn kaj sondosierojn.

Tre interesa estis la antaŭanonco de trisemajnfina perfektiga lingvokurso, kiu nomiĝas *Arto-Ŝoko*, temanta pri la vivo de Vincent van Gogh, gvidota de Katalin iam ie en Nederlando, se kolektiĝos sufiĉa multo da interesatoj. Inter ni jam estis kvar, kiuj pretos partopreni.

Rilate al tiu kurso li parolis pri ŝerco dum la unua de aprilo, kiam li mistifikis sian

edzinon, sendante al ŝi retmesaĝon, kiu ŝajne estis sendita el Japanio de direktoro de artomuzeo. Tiu invitis ŝin gvidi la kurson en Tokio. Sed lian trompon elperfidis kaj lia posta prisilentado pri la afero kaj ne plu aktualaj ligiloj en la mesaĝo. Malgraŭ la elreviĝo ŝi tamen ne povis ne ridi. Multe ridis ankaŭ ni dum tiu vere agrabla vespero.

la 20-an de aprilo 2006

Kursano de Wil ofte vizitas je <http://nl.lernu.net> la retan rubrikon *Vorto de la Tago*. Antaŭ nelonge la vorto de la tago estis *bezonatas*. La kunvenantoj demandis sin, ĉu tiaj vortoj vere estas pliriĉigo de la lingvo Esperanto. Aliaj ekzemploj estas:

la pomo manĝitas - la pomo estas manĝita
la libro belas - la libro estas bela.

Ĉu *beli* estas verbo? *Pomego* (Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko) diras pri t.n. *verboj el ne-agaj radikoj*:
Se radiko per si mem montras *econ* aŭ *staton*, la verba formo normale signifas 'estia' aŭ 'agi kun tia eco'.



Wil sendis saluton pro *Kongreso en Suda Koreio*. En reago ŝi legis, ke temas pri kongreso sur nipona (japana) insulo, sude de Suda Koreio.

Luit kaj Wil kunportis artikolon, kiu aperis en *Dagblad van het Noorden*. La artikolo temas pri domo, kiu nomiĝas *Nia*


domo. Antaŭ kelkdek jaroj la antaŭaj loĝantoj de la domo elektis tiun nomon. Nur antaŭ kvin jaroj klarigis alia loĝanto de Winschoten la signifon de la nomo al la nunaj loĝantoj. En la artikolo ne estas la nomo de tiu persono, sed ni supozas, ke temas pri s-ro *Molthoop*, membro de nia klubo. Luit sendis la artikolon al la redakcio de Fen-X.

Luit montris naskiĝkarton pro la naskiĝo de *Kian*, fileto de geedzoj en Barendrecht. Sur la karto estas jena teksto: *Ni bonvenigas vin, nova monda civitano*. Poste sekvas la nederlanda traduko. La geedzoj, kiuj estas neesperantistoj, opinias, ke ilia filo vere estas monda civitano kaj pro tio ili opiniis, ke ili sciigu la naskiĝon pere de monda lingvo: Esperanto. Luit atentigis siajn retajn korespondgeamikojn pri la naskiĝo de *Kian* kaj li petis de ili sendi Esperantan gratulon al la juna familio. (Intertempe venis gratulmesaĝoj el Ĉinio, Danio, Kubo, Madagaskaro kaj Sud-Afriko).

Jam dum multaj jaroj Bets sendas gratulkartojn, nome de la klubo, al tiuj membroj, kiuj festas sian naskiĝtagon. Ŝi demandas sin kial ŝi plu sendu gratulkartojn, ĉar ankaŭ en *La Verda Stelo* la klubo gratulas 'la heroojn de la festo'. Ĉu ni ne troigas? Ĉar ni scias, ke multaj membroj vere aprezas tian karton, ni decidis daŭrigi la gratulservon. Ankaŭ estonte Bets plenkore sendos gratulkartojn.

Johan kunportis ne nur tekokomputilon, sed ankaŭ plurajn aliajn 'strangajn aferojn' por klarigi al ni la funkciadon de *senkablaj retoj*. Li preparis sian prelegon bone. Por ke la ĉeestantoj pli bone povu sekvi la prelegon, li kunportis eĉ surpaperajn informojn. Por kelkaj (i.a. la protokolisto) tiuj ekstraj informoj ne vere helpis. Sed pro tio ne kulpas Johan.

La avantaĝo de senkabla reto estas ties fleksiĝemo. Tamen ĝi ankoraŭ ne estas vere fidinda. Depende de la cirkonstancoj ĝi ne ĉie bone funkcias. Sed ĉu kabla, ĉu senkabla, oni prefere bone sekurigas sian komputilon (i.a. per pasvorto), por ke la homoj ne povu misuzi la informojn en aliaj komputiloj (ekzemple numero de kreditkarto). Johan opinias, ke reto senkabla povas esti pli malmultekosta ol reto kabla.



la 11-an de majo 2006

La temo de la vespero estis *kvizo*. Luit kunportis bildnigmojn, kiujn ni volonte uzos alian fojon. Ĉi-foje ni klopodis trovi la ĝustajn respondojn al demandoj el la libreto *Look sharp, ĝeneralaj scioj*, kiun kompilis *Stefan MacGill*.

Estas demandoj kiel: *Pri kiu rivero verkis Mark Twain? Kiu verkis la romanon 'Hura!'*? *Kiu lando havas dek najbarajn ŝtatojn?*

Ni povis elekti inter 4 donitaj ebloj, se ni ne sciis spontanee la ĝustan respondon.

someraj renkontiĝoj

La 29-an de junio kaj la 3-an de aŭgusto la klubo organizis someran rendezuon. Kutime ni kunvenas vespere, sed dumsomere ni kaptas la okazon, se la veterdiodoj estas al ni favoraj, sidi ekstere kaj ĝui la sunbrilon. Tio eblis en junio en *Scandinavisch Dorp*, kie kolektiĝis kvin membroj.

La 3-an de aŭgusto pluvis. Ni do ne povis sidi ekstere.


Kelkajn semajnojn antaŭe ricevis Ineke Emmelkamp, membro de *Pasporta Servo*, afablan peton de franca geedza paro, *Marie-Noelle* kaj *Antoine Merlay*, ĉu ili estos bonvenaj dum la unua semajno de aŭgusto. Ineke invitis ilin al nia dumsomera rendezuo en la *Schimmelpenninckhuis* en Groningen. Ili tie efektive aperis kaj ankaŭ sep norduloj. Montriĝis, ke la gastoj intencas ferii en nia regiono per sia ruldomo.

Ineke invitis ilin por vespermanĝi, sed pro tio, ke Koos Scharroo kaj lia partnero Frans Schild havis tiun tagon iom pli da tempo por tion prepari, tiuj proponis vespermanĝi ĉe si.



Marie Noelle kaj Antoine Merlay

Estis tre agrabla multlingva vespero, ĉar Antoine kaj Frans ne parolas Esperanton, kaj nur Ineke parolas ankaŭ la francan. Helpe de ioma reciproka tradukado ni tamen bone interkompreniĝis. Ankaŭ ni estos en Liono pli ol bonvenaj.



Herzberg oficiale eknomis sin *Esperanto-urbo*



... die Esperanto-Stadt
... la Esperanto-urbo

Laŭ la decido de la urba konsilantaro, la germana urbo Herzberg nun oficiale uzos la titolon *Herzberg am Harz - die Esperanto-Stadt*, por diskonigi sin en la mondo. La oficiala leterpapero surhavas ankaŭ esperantlingvan version: *La Esperanto-urbo*. La voĉdono en la urba konsilantaro okazis marde la 11-an de julio, kaj neniu el la deputitoj de la kvar partioj en la konsilantaro kontraŭis ĝin. Tri el la deputitoj sindetenis en la voĉdonado.

La urbo Herzberg diversmaniere subtenas Esperanton kaj planas uzi la lingvon por reklami sin internacie. Ĝis nun la retejo de la urbo estas nur germanlingva, sed vendredon la 21-an de julio aperis tie informoj pri la unuaj pozitivaj reagoj al la nova decido.

La retejo rakontas, ke pli ol cent gratuloj pro la decido atingis la urbon el diversaj partoj de la mondo. Unu esperantista familio el norda Germanio intertempe aĉetis domon ĉe la bazara placo por vivi tie kaj malfermi butikon. Pluraj gratulantoj diras, ke ili volas viziti Herzberg, kaj unu restoraciestro volas krei Esperanto-picon.

“Mi kredas, ke la diligento kaj kuraĝo de la Esperanto-amikoj en Herzberg estos

premiita. Ĉi tio utilas al Herzberg. Nia urbo pro la engaĝiĝo de la esperantistoj jam nun havas bonan famon ne nur en Eŭropo, sed ankaŭ en aliaj kontinentoj. Ĉi tiun engaĝiĝon ni devas honori, kaj tial estis por mi ĝojo peti la konsilantaron aprobi la Esperanto-aldonon”, komentas la urbestro *Gerhard Walter*.

Jam de iom da tempo esperantlingvaj oficialaj vojmontriloj montras al la loka Esperanto-Centro.



Krome, Esperanto estas uzata en la ĝemelurbaj kontaktoj kun *Góra* en Pollando. Esperanto-arkivejo funkcias en la malnova urbodomo, kaj partatempa dungito de la urbo zorgas pri aferoj kun rilato al Esperanto. Krome la urbo provizas senpage aŭ tre favorpreze ejojn por Esperanto-

kursoj, konferencoj, kunsidoj, renkontiĝo kaj koncertoj.

La loka Esperanto-asocio aktivas jam de 30 jaroj, kaj lokaj kaj regionaj esperantistoj senpaŭze multflanke aktivis por akceptigi la novan titolon de la urbo.



malnova urbodomo kun E-arkivo

“Lastsemajne inter la urbaj deputitoj estis aŭdeblaj ankoraŭ kelkaj, kiuj estis malcertaj, dubaj, kontraŭantaj. Pro tio, ĝustatempe, ni ankoraŭ dissendis al ili leteron

kun taŭgaj argumentoj. Mardvespere urbestro Gerhard Walter petis en la kavalira salono de Kastelo Herzberg la urbajn deputitojn voĉdoni por la oficiale Esperanto-urbo Herzberg. Krom 3 sindetenoj ĉiuj aliaj deputitoj de ĉiuj 4 partioj voĉdonis por Esperanto. Poste ni ricevis multajn gratulojn kaj bondezirojn”, skribas la aktivaĵoj de la loka Esperanto-centro en komunikado dissendita la 15-an de julio.

La nova Esperanto-urbo Herzberg situas iom norde de la geografia centro de Germanio, en la suda parto de la ŝtato Malsupra Saksio (Niedersachsen). En la urbo estas proksimume 15.000 loĝantoj. Ekzistas ankaŭ alia urbo kaj du vilaĝetoj kun la nomo Herzberg en orienta Germanio. Tial la Esperanto-urbo ofte estas nomata *Herzberg am Harz*, laŭ la Harc-montaro, ĉe kiu ĝi situas.

el: *Libera Folio*



urbestro kun esperantistoj

Universala Kongreso 2008 en Roterdamo

La Universala Kongreso de Esperanto en la jaro 2008, kiam UEA iĝos centjara, okazos en la ĉefurbo de UEA, Roterdamo. Tion sciigis la ĝenerala direktoro de UEA, Osmo Buller, en Florenco. La freŝa decido de la estraro de UEA, farita en Florenco, ankoraŭ ne estas oficiale diskonigita. Ĝi tamen estis menciita dum la programero *Centro Oficejo respondas* mardon matene. La kongreso en 2009 eventuale okazos en Bjalistoko.



Roterdamo

En la jam tradicia programero kutime ĉefe aperas teknikaj demandoj pri konteltiroj kaj publikigado de retadresoĵoj en la kongreslibro. Same estis ankaŭ ĉi-foje, sed kiam nederlanda kongresano demandis pri famoj, laŭ kiuj la Universala Kongreso de

Esperanto en la jaro 2008 povus okazi en Roterdamo, Osmo Buller sciigis novaĵon.

“Ni povas forgesi la finaĵon -us tiurilate. La estraro de UEA ĵus decidis, ke en 2008, kiam UEA festos sian centjariĝon, la kongreso okazos en Roterdamo. La kongreso estos iom speciala, ĉar ĝin organizos UEA mem, ĝi ne okazos laŭ la invito de landa asocio aŭ loka klubo. Ni kompreneble faros la kongreson kunlabore kun la landa asocio, Esperanto Nederland, sed la inviton faris UEA, kiu invitis sin mem al sia propra ĉefurbo”, rakontis Osmo Buller. “Pri postaj kongresoj ankoraŭ ne estas certaj informoj”, li aldonis.

“Pri la jaro 2010 mi absolute ne povas ion diri, ĉar tiam ni devos decidi pri la sekva futbalĉampiono. Se mi dirus ion, tio malfortigus nian pozicion ĉe la internacia futbala federacio FIFA. Sed pri la jaro 2009 mi povas diri, ke septembre ĉi-jare mi iros al Pollando por esplori kelkajn lokojn.”



Mozo

Pollando invitis la Universalan Kongreson por la jaro 2009 ĉar tiam plenumiĝos 150 jaroj post la naskiĝo de Ludoviko Zamenhof, kaj Bjalistoko estas unu el la kandidat-urboj. La finan decidon pri la kongresurbo 2009 faros la nova estraro de UEA, elektota en Jokohamo venontjare.

Inter la demandoj al la Centra Oficejo estis ankaŭ plendoj pri hotelaj problemoj. Pluraj kongresanoj, kiuj mendis kaj pagis hotelĉambron pere de UEA, poste eksciis, ke por ili ne estas loko en la mendita hotelo. Anstataŭe ili devis ekloĝi en aliaj hoteloj en malpli oportuna loko, sen klarigo kaj sen pardonpeto, plendis iu ĉeestanto.

“Tio ne estas nia kulpo, sed mi pardonpetas. Kulpas la hoteloj kiuj akceptis tro da rezervoj. Tiel estis pli da homoj ol ĉambroj, ĉar ili atendis, ke iuj ne venos, kaj devis tiam trovi aliajn lokojn”, klarigis konstanta kongresa sekretario Clay Magalhães.

“Ĉi tiu kongreso estis escepte malfacila pri loĝado, ĉar estis tiom da malgrandaj hoteloj. Ni mem loĝas en iu domo, en kiu estas en ĉiu etaĝo alia hotelo, iuj hoteloj havas nur kvin ĉambrojn. Bonŝance ne iĝis tiom da problemoj kiel ni timis, sed iom da problemoj”, diris Osmo Buller.

el: Libera Folio

PETO PRI RETPOŝTADRESO / VERZOEK OM E-MAILADRES


Karaj membroj, beste leden,

Komunikiĝi kun vi estus pli rekte kaj facile, se la klubo disponus **vian retpoŝtadreson**. Tial ni petas de vi, se vi havas tian interkomunikilon, sendi la adreson al la redakcio.

Hierbij het verzoek, als u beschikt over een **e-mailadres** dit te zenden aan de redactie. Communicatie verloopt daarmee sneller en gemakkelijker.

La retadreso estas: / het e-mailadres is:
laverdastelo@pingveno.nl

dankas pro la kunlaboro la estraroj de
ESPERANTO NOORD-NEDERLAND



Kafo-kolore

Kafo estas hodiaŭ vera socia fenomeno. De trinkaĵ-aŭtomato al stratangula drink-ejo, ĝi kunigas ĉiutage plurajn milionojn da fideluloj. Pro ĝiaj ankoraŭ enigmaj devenoj, ne mankas kialoj por nervoziĝi. Historio de eta nigrolikvaĵo, kiu ekkonkeras la mondon.



De la matenmanĝo ĝis la paŭzo de la deka horo, la kafo estas neevitebla etapo de la ĉiutaga vivo kaj vera socia fenomeno. Ja neblas ne trovi funde de oficejo aŭ en la koridoroj de fakultato kaf-maŝinon. Tiu eta nigra metronomo estas tiom mistera, kiom enigma. Kvankam oni scias, ke Venecianoj estas la unuaj importintoj de kafrikoltaĵoj, oni plu ne scias, kie ĝi estis malkovrita. Ĉu ĝi devenas de Persio, de Afriko aŭ de alia loko? Oni pri tio ja havas pli-malpli precizan ideon, sed inter Etiopio kaj Jemeno, oni plu hezitas. Tamen certe el tiuj sunplenaj regionoj al ni venis ĝiaj plej belaj legendoj.

La plej fama temas pri la araba ŝafisto Kaldi. Ĉar li momente endormiĝis kaj ne plu atentis pri siaj kaprinoj, tiuj ĉi tion profitis por manĝi ruĝajn kaj nekonatajn fruktojn. Vekiĝante, la juna paŝtisto trovis

ilin ekstreme viglaj kaj ekscitataj. Scivolema, li portis la kulp-fruktojn al la najbara monaĥejo. La religiuloj, post ekzameno, konkludis, ke la fruktaĵo havas certan efikon sur la dormon. Tial ili ĝin uzis dekokte por plilongigi siajn preĝojn.

La kafo ek-eniras en la kortegon de Ludoviko XIV

Pli proksime al ni, tempe kaj loke, en la kortegon de Ludoviko eniras la kafo. Soliman Aga, ambasadoro de la sultano de Konstantinopolo, alvenas al la reĝa kortego kun tre mistera trinkaĵo. La 'qawah' de la ambasadoro ekricevis sukceson, nur kiam ŝajnas, ke korteganino frandas ĝin kun iom da mielo.

Pli ol kvindek specoj nuntempe ekzistas. El la plej konataj, la Arabica kaj la Robusta, 90% el la monda produktado. Tropika produkto, la kafo bezonas du aferojn: varmecon kaj malsekecon, kaj altitudo aldonas ion plian al la aromo. "Simplas, la kafo kultiviĝas inter la tropiko de Kankro kaj tiu de Kaprikorno", konfidas Jean-Paul Logereau, kafrostisto ĉe placo de la Gobelins, en Parizo.



Ne funde de ĉiovendeja fako frandemulo kontentigos siajn papilojn kaj sian serĉon de bona grajno. La kafrostoj estas la reĝolandoj de la kafo. Apenaŭ enirinte, oni tie spiras la odoron de kafo freŝe rostita. La sakoj ĵus alvenintaj plejparte de la Havre-haveno, elmontriĝas en la tuta loko en sia intima tolvestaĵo. Oni preskaŭ kredus sin sur afrika foirejo aŭ en sud-amerika vendejeto. Tial oni rapide emas plonĝigi sian manon en la fab-banon. Tie, oni fle-gas, oni dorlotas la kafon.

'Kafo boligita, kafo fuŝita!'

Jean-Paul Logereau estas senindulga defendanto de la kaffiltrilo kaj rapide forsendus diablen ĉiujn *Moka* – la metal-kafmaŝinojn kun du kun-ŝraŭbeblaj elementoj.

“Bonan kafon oni faras per tre varma akvo, sed ne bolanta”, substrekas la kafrostisto. “Super 100° C la internaj aromoj de la grajnoj, kiuj faras ties apartan guston, estas bruligataj. La gusto tiel perdiĝas kaj la kafo perdas ĉiujn siajn kvalitojn”. Alidirite ‘kafo boligita, kafo fuŝita!’ se oni kreas la popolan diraĵon. “La tutan kafo-guston konservas la filtrilo”, aldonas la

dommastro. La or-filtrilo nekontesteble estas la plej bona por ricevi kvalitan kafon. Ĝi eble kostas dek kvin eŭrojn, sed daŭras tutan vivon!”

Vjetnamio kaj Ĉinio, la novaj majstroj

Kvankam la tradiciaj kafproduktantoj estas ĉefe sud-amerikaj kaj afrikaj, la konkurenco estas forta komence de ĉi tria jarmilo ĉar Vjetnamio kaj Ĉinio nun inter si disputas la unuajn lokojn pri produktado de Robusta.

Sed la kafo varmigas ĉefe la Nordon. Malproksime de la Kankro- aŭ Kaprikorno-tropikoj, la plej grandaj konsumantoj estas nekontesteble skandinavo. Finlandanoj lokiĝas supre de la tabelo kun 12,4 kilogramoj jare kaj por loĝanto, malproksime antaŭ la svedoj, tamen bone due lokitaj kun 10,1 kilogramoj. Francoj trinkas nur 5,9 kilogramojn kaj Italio, patrolando de la Cappuccino, estas en la vostogrupa kun nur 4,8 kilogramoj.

Tamen el ĉio ne eblas nei, ke kafo restas mistera tiom pro sia historio, kiom pro sia uzado kaj nin nur nervozigas!

el: la revuo *HADES*



Esperanto Elektronike

Dum UK en Florenco debutis la plej granda informmaterialo de kaj pri la internacia lingvo, en formato de 8 gigabajta **DVD-ROM-o**. En tiu ĉi DVD troveblas bunta kolekto, kiu celas helpi 'malkovri' Esperanton aŭ disponi fonton de utilaj materialoj por plua perfektigo, informiĝo kaj informado.


La enhavo estas dividita laŭ la 3-punkta agadplano de Universala Esperanto-Asocio: *Informado, Instruado, Utiligado*. En ĉiu ĉapitro troveblas kelkaj partoj; iuj el ili estas dividitaj per submenuoj. Neniu ero estas origine farita nur por tiu ĉi DVD. La merito de la kompilintoj estas la kunmetado, kolektado, selektado kaj akiro de uzaj kopirajtoj de la publikigitaj verkoj, programoj kaj paĝoj. Eĉ se oni havas komputilon kaj retaliron, malfacilus loki tiom da utilaj aferoj en bone organizitan sistemon kaj havi ilin disponeblaj kaj alireblaj ĉiam facile. La kursoj, tekstoj, vortaroj, fakaj artikoloj, dekoj da literaturaj verkoj kaj muzikpecoj, filmoj, fotoj kaj arkivaĵoj kune kun la libere uzeblaj komputilaj programoj ne nur la esperantistaron riĉigos, sed mirigos ankaŭ la eksterulojn, kiuj ĝis nun dubis pri la valoroj kaj utiligeblo de nia lingvo. Mi skribis *mirigos*, kondiĉe ke vi, ni disvastigos la materialon, helpos en tio, ke universitatoj, lernejoj kaj publikaj bibliotekoj ekhavu ĝin kaj uzu ĝin. La akiro ne povas havi financajn malhelpojn.

La DVD, produktita ĝis nun en 10 mil ekzempleroj kaj tradukita en dudekon da lingvoj akireblas kontraŭ malmulta mono (kontraŭ 2-6-9 eŭroj depende de la kondiĉoj kaj kvanto). Laŭdindas la aktiveco de ekzemple francaj samideanoj, kiuj antaŭmendis 3 mil ekzemplerojn por propagandaj celoj.

Pli pri la DVD-projekto vi povas ekscii ĉe: **www.esperantodvd.net**
Rimarko: La enhavon de la DVD oni rajtas kopii, disdoni kaj uzi por nekomercaj celoj kondiĉe, ke ĝi estos kopiata senŝanĝe kaj inkluzive de la kopirajto-teksto.

Aĉeteblo: UEA: € 6.00 (sen AVI); FEL: € 7.25 (kun AVI) (*red*: AVI = BTW)

el: Edukado.net





ESPERANTO NOORD-NEDERLAND
T.W.S. Mansholtstraat 25
9728 MC GRONINGEN



ESPERANTO - taal zonder grenzen